

## ĈAMPANO

De Pasquale-Jodice-Di Francia  
Esperantigo: Emanuele Rovere

Ĉampano, por tostad' al renkonto kun vi, jam propriet' de alia.  
Okazis post ies invito "ni iru ĉiuj festi en hejmon mian".  
Apenaŭ la festen' komenciĝis, sendrinke mia kapo turniĝis.  
Ĉirkaŭe jam nenio plu gravis, rigardoj miaj nur celis sekvi vin.  
Ĉu povas mi akompani vin hejmen?  
"Preteksto tre banala por resti iom sola mi kun vi".  
Kaj poste forĵeti ĉiujn timojn, vin ami simple tiel...  
I' unuan fojon, la lastan.  
Ĉampano, por ni dolĉa sekreto pri amo kulpa, malpermesata.  
Nun restas nur ĉi glaso malplena, dolora forĵetinda rememor'.  
Mi scias, ke vi min rigardadas, ĉar al vi ŝajnas strange  
tostadi sen virina kunestad'. Sed mi, mi devas celebradi  
la finon de la Amo. Do: kelnero, ĉampanon!